

SUDFRANCIA STELO


Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1981



N° 78

Nimo atendas vin!

La kongreso okazos en la N I M A C E N T R O P A B L O N E R U D A
Placo H U B E R T R O U G E R (apud Bulv^{do} Jean Jaurès)

Tie ni probable lunoos, sed ne povos tranokti. . .

Bonvolu tuj rezervigi hotelon indikante kategorion kaj prezon al

S-ino M O U N I E R , 17, Av. de Lattre de Tassigny

30 000 N I M E S - Tel. (66) 2 6 . 5 2 . 7 6

P R O G R A M O

SABATON : je la 16-a : Laborkunsido
je la 19-a : Lunco
je la 21-a : Distra Vespero

DIMANĈON je la 9-a : Laborkunsido
je la 11-a : Prelego : " Esperanto en la lernejoj " fare de
S-ro LENTAIGNE
je la 12-a : Komuna manĝo en restoracio (prezo = 36 frankoj)
je la 15-a : Vizito de la " DOMO de l'Laborkompanioj "

Aliĝu plej rapide, ĉiaokaze antaŭ la 1-a de Majo.

Eblos apartaj kunvenoj por gejunuloj kiuj estas tutkore invititaj. Ili havas eblecon tranokti Sabaton en "Foyer ALBARIC", 27, Rue Jean Reboul por 15 F^{oj}. Ili kunportu dormsakon aŭ surloke luan littukojn (10 F^{oj})

- § - § - § - § - § -

R E N O V I G O de la F E D E R A C I A K O M I T A T O

Pro renovigo de la triono de la federacia komitato ĉi-jare vakos la posteno de la jenaj komitatanoj :

- D-ro SALAN (mortis la 5-an de februaro), S-ro DELIGNE, S-ino VOLPELIERE, S-ino NEGRON kaj S-ro ENSUQUE. Krome S-ro RAYNAUD kies mandato finiĝos en 1982 tamen petis sian anstataŭigon kiel komitatano.

La kandidatoj por la federacia komitato bonvolu sin anonci al la federacia sekretario (Jean AMOUROUX, 1, Rue de Sorède, 66000 PERPIGNAN). Memkompreneble la antaŭaj postenuloj povas rekandidatiĝi kaj kandidatoj de urboj de la Federacio ne ankoraŭ reprezentataj en la komitato estos bonvenaj.

- § - § - § - § - § -

Por la tagordo vi bonvolu ankaŭ skribi am mi pri demandoj, kiujn vi deziras pridiskuti dum la federacia kongreso.

VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

K V A R A M E D I T E R A N E A S E M A J N O Ĉ E M A R O

Kiel kutime ĝi okazos en SETE, en la agrabla feriejo LE LAZARET. Ĝi situas ĉe la maro kaj estas ĉirkaŭata de 3-hektara parko.

Ĝi okazos de la 15-a ĝis la 20-a de septembro (fakte dum 6 tagoj, bedaŭrinde).

- 1)- Aliĝo kaj kursoj : 45 F
- 2)- Laŭ peto, mi povas mendi loĝadon kaj la 3 manĝojn
 - a) Prezoj : 580 F por 1 persono en 1-persona dormĉambro
455 F " 2 " " 2- " " "
(post la 15-a de Majo, aldonu 30 F
 - b) Antaŭmendo ebla ĝis la 1-a de Julio
 - c) Nur 40 litoj estas menditaj
 - d) Mendo valoras nur post antaŭpago de 50 F

Informoj kaj aliĝoj al ESPERANTO, 5, Rue du Docteur Roux, 34000 MONTPEL.

-§-§-§-§-§-§-§-§-§-§-§-§-§-

PREZIDANTO L L E C H - W A L T E R en la GRANDA
KATALUNA ENCIKLOPEDIO

La 15-a volumo de la granda kataluna enciklopedio ĵus aperis kaj la tuta serio estas altvalora trezoro por la amantoj de la lingvo kaj kulturo de Katalunio.

Ĉe la litero "L" ni trovas la nomon de LLECH-WALTER Renat, kun la sekvanta teksto :

" Verkisto. En 1921 li fondis kun sia frato la klubon "Le Cénacle" (kun kursoj de Esperanto). Prezidinto de la Franca Unio por Esperanto; Prezidanto de la Gajaj Trobadoroj; Prezidanto de la Politeknika Asocio kaj de la grupo por katalunaj studoj. Aŭtoro de kurso pri la kataluna lingvo kaj aŭtoro de verko pri la kataluna literaturo".

En tiu granda enciklopedio ĉe la vortoj "esperantisme" kaj "esperanto", longaj artikoloj klarigas la aferon kaj kliŝoj ilustras la klarigojn.

Oni scias ke René LLECH-WALTER estas la prezidanto de la L.K.K. de la 73-a Franca Kongreso en PERPIGNAN (Francio) de la 5-a ĝis la 9-a de Junio 1981 kun partopreno de multaj hispanaj samideanoj (Katalunia Parto).

- § - § - § - § - § -

A L A I N P O H E R PREZIDANTO de la FRANCA SENATO
HONORA PREZIDANTO de la 73-a FRANCA KONGRESO

S-ro Alain POHER akceptis la honoran Prezidantecon de la 73-a Franca Kongreso kiu okazos en PERPIGNAN de la 5-a ĝis la 9-a de Junio 1981.

Senatano Francis PALMERO, kiu prezentis antaŭ la Senato la leĝan proponon por la instruado de Esperanto en la mezaj kaj superaj lernejoj akceptis ankaŭ estis honora prezidanto de tiu franca kongreso.

Informojn pri la 73-a landa kongreso donas "Centre Culturel Esperantiste, 72, Avenue du Général De GAULLE, 66000 PERPIGNAN

- § - § - § - § - § -

P O S T S K R I B O : El letero skribita al Ges-oj DELIGNE (Narbonne), AUTHIER (Béziers), VIERNE (Montpellier), RAYNAUD (Alès), MOUNIER (Nîmes) k. HENIN (La Canourgue), S-ro Llech-Walter konsilas aparte ke "ĉiu el ili klopodu propagandi la aferon ĉe la membroj, lernantoj kaj simpatiantoj, en sia sfero, celante digne reprezenti nian Federacion ĉe la Nacia Kongreso..."

D-ro Georgo SALAN

15 - 11 - 1901 * 5 - 2 - 1981



Estas tre malfacila tasko memoriĝi nur en kelkaj minutoj tre longan vivon. Unue, nome de la NIMA-GRUPO, mi profunde doloras la perdon de nia Prezidanto D-ro GEORGO SALAN. Antaŭ la dua mondmilito, li estis unu el la pioniroj por enkonduko de la internacia lingvo Esperanto en NIMO, ĉirkaŭe la jaro 1923, instruante nian lingvon ĉe la "Bourse du Travail". Pli poste, en 1927, li longe vizitis Sovet-Union kiel Akademiano de Esperanto.

En Nimo, dum tiu bela epoko, la movado estis tre vigla kaj riĉa; la kunvenoj estis oftaj kaj la grupo eĉ posedis propran kampodometon, nomata "La Daĉa".

Sekve pro internaj miskompreniĝoj en SAT-movado (afero pri Lanti) kaj pro profesiaj kialoj - intertempe eksplodis la mondmilito-, kontraŭ sia propra volonte, D-ro SALAN forlasis la movado ĝis la jaro 1973. Tiam li revenis plenkora da entuziasmo kaj pasio kiel studento kiu amas siajn studaĵojn, alportante nekomanan lertecon kaj neforgeseblan valoron kiel oratoro kaj verkisto, sen perdi nenion pri la lingvo, pri sia trezoro en esperantesprimoj : tio estas la plej stranga afero post lia longjara silento .

Okaze de la Regiona Kongreso en Aleso -marto 1973-, tute neantaŭvidebla ŝanco ĉirkaŭbrakis min, sidante dum la labortago apude D-ro Salan absolute nekonata tiuepoke. Ni prezentis nin reciproke, sed tuj sento de estimo invadis mian menson tra la konversacioj kiujn ni havis ĝis la vespero. Vere, li estis ora pluvo kiu falis el ĉielo; kompreneble, oni preparolis pri respektivaj okupoj, pri esperanta medio. Tuj li oferis siajn sciojn kiel redaktoro por S.F.S., helpante min plibonigi la gazeton. Preskaŭ mi ne kredis miajn okulojn post longa tempo da malfacilaĵoj. Finfine la gazeto ricevos oksigenon kaj trankvilecon por la estonto. Tiun postenon kiel redaktoro li konservis ĝis lia morto. Tre akurate li tralegis la originalojn, poste kontrolis la platojn antaŭ definitiva enmeto al preŝmaŝino. Intertempe novaj sugestoj kaj proponoj pere de multnombraj artikoloj D-ro Salan ofte trandonis dank'al siaj spertoj.

Tamen, historia dato alproksimiĝis : la 30-jara datreveno de la liberiĝo de l'kampkoncentrejoj post la 2-an mondmilito. La ideo kaŝita por eldoni esperantlingve libron pri siaj travivaĵoj realiĝis ĝuste en la jaro 1975. Bonŝance, feliĉaj hazardaĵoj helpis nin, ĉar necesis valora tajpistino konanta bone la lingvon por realigi tiun novan tradukon el franclingva verkado. Mia fratino Maria, loĝanta en Italio tiame, ĝuste reveninta post pluraj jaroj da laboro ĉe U.E.A., en Centra Oficejo de Rotterdam.

Oportune kaj volonte ŝi akceptis veni en Nimo por ekkomenci "la Nuda Vero". Pri tiu laboro, permesu min ke mi rememorigu al vi la karakteron de D-ro Salan, lian obstinon montrante tute sian personecon, sian akuratecon, la precizigon de sia totala sindonemo por realigi tiun gigantan, memorindan verkadon kiu daŭris preskaŭ 6 monatoj, laborante sinsekve, ĉiutage almenaŭ 7 joroj, mi vidis konstante la belecon de lia severeco ĉar li volis ricevi perfektecon!

Nur Dio scias kiom da fojoj oni faris kaj refaris la liniojn, oni aranĝis la piednotejn, oni konstruis la titolojn por fine enpaĝigi la foliojn. Vere ŝajnis senfina laboro ! Finfine la rezulto estis bonega kaj la libro ĉirkaŭiris la mondon.

Tiu ŝatado por Esperanto vojaĝigis D-ron Salan en multaj landoj dum la lastaj jaroj : interalie la U.K. en Hamburgo (Germanio), Rejkjaviko (Islando), Saragoŝo (Hispanio), Roterdamo (Nederlando); eĉ lia scivolemo kunportis lin en Torino (Italio) kie mi plezurigis, kompreneble, akompani lin persone, okaze de la geedziĝo de Maria kun Geoffrey King (anglo). La ceremonio okazis en katolika preĝejo pere de Pastro Ciccanti kiu paroladis nur esperantlingve ! Do tiu ĉeesto konfirmas la vortojn de unu el liaj filinoj post la funebra ceremonio - lin mi bone aŭdis- dirante " Mia patro kelkfoje konfesis al mi ke eĉ dum siaj noktaj revoj li aŭdis paroli esperanton"...

Salan, kun Laval, Llech-Walter, Raynaud, Lentaigine kaj Ge-Volpelière, estis unu el la vivantaj monumentoj de nia regiono, E-juveloj de Francio.

Kun grava kortuŝigo kaj emocio mi rememoras ke, dank'al D-ro Salan, la Ni-ma Grupo havas sidejon konstantan por la kunvenoj en la Kultura Centro "Pablo Neruda," krome en venonta majoj Nimo gastigos la E - Kongreson de Langvedoko-Rusiljono. Bedaŭrinde, kiel meteoro, D-ro Salan lumigis nur kelkajn jarojn, nian idealon. Tamen unuiginte ni sekvu diligente lian ekzemplon !

Roberto FRUS



LINGVA ANGULO

A M I , Ŝ A T I

Responde al Lentaigine (en N° 77)

La konfuzo, laŭ kiu iuj diras "ŝati" anstataŭ "ami", kiam ne temas pri personoj, venas verŝajne de la angla lingvo. La anglalingvanoj diras : " I love you " , sed "I like chocolate".

En Esperanto kiel en franca lingvo, estas ĝuste, kaj konforme al la Zamenhofa uzo, apliki "ami" ankaŭ al nevivaj estaĵoj. Oni plene rajtas ami la guston de sukeraĵoj (aŭ de pipro), la odoron de rozo, la belecon de virino aŭ la versojn de poeto.

Pri tio PIV estas perfekte klara (ĉe ŝat/i , Rim. 1 =

- Oni amas ĉion, kio plaĉas al la spirito, koro aŭ sensoj ; oni ŝatas tion, kies valoron oni opinias granda, ekz. :

kiel kuracisto mi ŝatas la gadoleon, sed persone mi ĝin tute ne amas.

Rim. 2 =

Pro personaj lingvaj kutimoj, multaj uzas ŝati anstataŭ ami, kiam la objekto ne estas personnomo, ekz. :

ŝati kapon, sukeron, danci

Tiu uzo, kvankam ofta, estas kontraŭa al Zamenhofa difino kaj uzado, kaj krome ne kongruas kun la senco de "malŝati".

Tio ŝajnas al mi nekontestebla .


LAVAL

K R U C V O R T O J

Horizontale



- 1 - Majstra verko de la XVIII jarcento
- 2 - Konstelacio en la boreala hemisfero
La «nefermita» estas publika
- 3 - Ĝi povas esti el ŝtono, fero aŭ akvo - Inverse: fiŝo
- 4 - Bioinstrumento por infanoj - En panoplio
- 5 - Sufikso - Tiel povas aperi esperantisto... sed tamen
- 6 - Li tamen povas esti pekulo
Blanka pulvero uzata por fabriki sapon (R) Sufikso
- 7 - Mumpso (R) Pronomo
Ruĝeca tero uzata kiel pigmento por farbo
- 8 - siglo por Esperanta asocio. Pŭsi (R) Nomo de litero
- 9 - Urbo en Kario, kun tre fama templo de Afrodite. Metal (R)
- 10 - Ne multe (R) - Itala havenurbo
- 11 - En "La Bovoj" de P. Dupont la plugilo estas
el ligno de tiu arbo (R)
sentadi sensan plezuron pro la posedo de io (R)
Nedifinita adjektivo
- 12 - Tia estas la homa estaĵo (R)



Vertikale



- 1 - (p. p. tago) Proksimigi
- 2 - Scienciga prefikso - Ordonema kaj senindulga mastro
- 3 - Malnova mezurunuo de longo - Tiu de Aŭstrio al Serbio kaŭzis la unua mondmilito (R)
- 4 - Enkonduki en la organismon la mikrobo de infekta malsano - konvene
- 5 - Kun li ni havas rilaton - sidloko (R)
- 6 - Ĝi ne defendas kontraŭ doloro - Artikolo - Inverse; moviĝi (R)
- 7 - Konjunkcio - Latina litero (R)
- 8 - Arbo aŭ arbeto ĝardene kulturata pro la grandaj ornamaj floroj.
Migdalo ĉirkaŭita de malmoligita sukero.
- 9 - Nepara kaj meza osto de la homa kranio - Ĝi loĝas kun amo (R)
- 10 - Inverse - El fremda oni tranĉas larĝe (R) - Laŭta subita sono de la voĉo.
- 11 - Eskorto - Pronomo
- 12 - Seksa sporo de iu fungo - serpento ne danĝera por homoj.


* - (R) nur radiko

* - solvo de la antaŭa problemo


F	U	L	M	O	F	O	R	I	G	I	L
E	L	■	E	P	I	D	E	M	I	O	■
N	A	I	V	U	L	■	K	I	S	■	E
I	N	K	■	N	I	K	O	T	I	A	N
K	O	T	■	T	O	R	N	I	S	T	O
O	■	E	K	I	■	L	I	N	T	E	L
P	E	R	I	O	D	■	■	D	O	N	O
T	R	O	L	■	E	T	N	A	■	D	G
E	G	■	T	I	L	I	O	■	T	I	O
R	O	D	O	D	E	N	D	R	O	■	S
O	T	O	■	O	K	T	O	B	R	O	■
J	O	G	O	■	T	A	J	L	O	R	O

Solvo
de la krucvortoj
aperinta sur la № 77



5 minutoj de paŭzo




Venontan fojon ni elspezos pli bone nian monon.



Hieraŭ, mi trovis ankoraŭ du el viaj kokidoj en mia ĝardeno.




Vi bonsânecas sinjoro, ĝis nun tiun novan medicinon mi eksperimentis nur sur la ratoj.



Cu vi rimarkis karulo, al bebo kreskiĝis unua dento ?




Mi havas alian urĝan telegramon.




SEN VORTOJ



5 minutoj de paŭzo



Venontan fojon ni elspezos pli bone nian monon.



Hieraŭ, mi trovis ankoraŭ du el viaj kokidoj en mia ĝardeno.



Vi bonsancas sinjoro, ĝis nun tiun novan medicinon mi eksperimentis nur sur la ratoj.



Cu vi rimarkis karulo, al bebo kreskiĝis unua dento ?



Mi havas alian urĝan telegramon.



SEN VORTOJ



Someraj Universitataj Kursoj. (Liege-Belgio)

Ĉi-jare multaj el vi ne havos la okazon partopreni la UK sed tamen amos partopreni internacian aranĝon. Jen okazo ĝui internacian etoson, sed samtempe klerigi kaj distri sin.

La 5-a sesio de SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ, okazonta en LIEGE (Belgio, de la 5a ĝis la 12a de julio 81 prezentos al vi la jenan programon :

- Prof. Marinov, el Bulgario : "Sociekonomia bazo de la nuntempa ekologia krizo" - "Ekologiaj disponfontoj por elnutrado de la loĝantaro".
- Prof. Frank, el la Kibernetika Instituto de Paderborn : "Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva".
- Prof. Denoel, el Liège : " Elementoj de homa fiziologio en rilato kun la edukado".
- D-ro Lehl, el FR Germanio : "Enkonduko en la informpsikologio kaj ties pedagogian aplikon".

Okazos : Kursoj (matene k. Perfektiga posttagmeze), oficialaj akceptoj, studvizitoj, ekskursoj en Liège kaj regiono. Vespere, kultura aŭ distra programo (filmoj, debatoj, sportoj, pedagogimetodoj por handikapuloj, ktp..)

Aliĝo al 1 kurso dum unu semajno : 1200 BF (900 bf por studentoj).
Restadkosto dum 1 sem. 2500 BF. Skribu al S.U.K., BP 9 , B-LIEGE X

A L I Ĝ I L O

al 73a Franca Kongreso de Esperanto en PERPIGNAN (5a ĝis 9a de Junio 1981)

-o-o-o-o-o-o-

NOMO :
 Antaŭnomo : Profesio : (1)
 Adreso : Adro : (2)
 Dato : Subskribo :

Por uzo de la administracio

Listo hoteloj

Pago ricevita

Kongreslibro

KOTIZOJ : (ĝis la 28a de Februaro 1981 = Kongresan(in)o.....Fr 100

Junul(in)o inter 15 k 25j FR 65 : Geedzoj.....Fr 150

" " 10 k 15j FR 40 : Poste : plipagi 10 %

Eksterlandano : senpage

Postsekonto : 1343-58 M. Montpell.

(1) (nur por statistiko) (2) (nur por junulo).



73-a FRANCA KONGRESO de ESPERANTO PERPIGNAN * 5-9 junio 1981

O F I C I A L A P R O G R A M O

-o-o-o-o-o-

Vendredon 5-an de Junio : Akceptejo malfermita ĉe Palaco de la Kongresoj, Promenade de la Platanoj , je la 14-a.

Je la 20-a : Interkona vespero ĉe la "Cafeteria", Palaco de l'Kongresoj.

Sabaton 6-an de Junio : Estrarkunveno je la 9-a

Je la 10-a : Inaŭguro

je la 12-a : Honora Vino

je la 15-a : Publikaj debatoj pri minoritataj lingvoj kun partopreno de reprezentantoj de Katalunaj Kulturaj Centroj el Barcelono k. Perpignan.

je la 20-a : Arta Vespero.

Dimanĉon 7-an de Junio :

Je la 9-a : Konsilia Kunveno

Je la 10-a : Ĝenerala Kunveno

Je la 14-a : Konsilia Kunveno

Je la 15-a : Ĝenerala Kunveno (2a Parto)

Je la 17-a : Fakaj Kunvenoj - G.E.E.

Je la 20-a : Bankedo kaj Balo ĉe Restoracio "LE RALLYE", Place des Variétés (apud la Promenado de l'Platanoj)

Lundon la 8-an de Junio

Je 8 h 30 : Estrara Kunveno

Je 9 h 30 : Konsilia Kunveno

J.10 h 30 : Praktika Kunveno : "Kiel fari Esperanton utila al la Esperantistoj"

J. la 14a : Foriro de la Palaco de la Kongresoj al la "Côte Vermeille" tra Argelès s Mer, Collioure, Port-Vendres, Banyuls s Mer. Vizito de la Marlaboratorio "Arago"

Je la 21a : Folkloro Vespero en la ĝardenoj de la fama ceramika ateliero "Sant Vicens"

Mardon la 9-an de Junio

Je la 7-a : Foriro de la Palaco de la Kongresoj per specialaj aŭtobusoj al Barcelono kun vizito de la urbo kaj tagmanĝo en tipika restoracio "La Masia" sur la Monto " Tibidabo" kun rigardo super Barcelono.

Organizantoj : Centre Culturel Esperantiste, 72, Av^e du Général de Gaulle ,
66 000 PERPIGNAN . Télé. (68) 34.22.18

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 1^{er} Trimestre 1981